



# PENSEO

*N-ro 285*

*jul. / 2015*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)



### senĉela demenco

la enmana koridoro rekta nur de kvindek metroj  
rabis de mi tutan nokton sed la celo restis fora.  
metro aŭ lumjaro? serĉis mi flugilojn kaj rad-aron.  
perversio de spactempo faris min jam pirofora.

2012.11.22 - 2

### eklipso de la luno

la gravito neonlampa kaŭzas erupcion ofte.  
esplorista flagomasto falas kaj stariĝas softe.  
ardo kaj malvarmo ĉiam sin apogas sur la suno.  
tajdoj briditaj kiel roso vaporigas en pasumo.



2012.11.23 - 5

### temo sekura

julio, sunlumo, fiŝisto senvesta...  
sur boato li kirladas la lageton per la jolo.  
ondo, fonto, tajdo, ŝvito... kugloj.  
rompiĝas la reto. sango. ĝemoj. bolo.


2012.11.24

### varme

la lampo daŭrigas la sunon.  
pluvo post pluvo ankaŭ pluvo...  
ĉielo la nigra tremas frosta.  
kato ĝuas duŝon en etuvo.

2012.11.25 - 6

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Aŭtuno

Tra la padoj de majo  
krias deziroj de birdo,  
nostalgio pro flugiloj  
en la ĝardenoj de l' luno  
plena je lum' kaj fantazi'.

Tra la padoj de majo  
svenas lilioj, kuŝas  
sekaj folioj sur sonĝoj  
de unu plia aŭtuno.

Juiz de Fora, 02/05/ 2015.

### Sur la mezo de l' vojo kuŝis hundo

Sur la mezo de l' vojo kuŝis dormanta hundo;  
kaj tute senĝene ĝi endormigis sian liberecon  
sur la sungaja grundo de l' malvarma mateno  
maja.

Al ni ĝi ne petis permeson, ĝi demandis  
nenion;

fakte ĝi eĉ pri ĝeno ne scias: ĝi tutsimple

ekzistis tie.



Juiz de Fora, 23/05/2015.

## Vekiĝo

En mia nefinita universo,  
Dio estas la interna suno,  
kiu lumigas l' animon  
ankoraŭ vagantan  
tra la grizaj nuboj el iluzio.  
Sed tiam, laŭgrade,  
per lungutoj de Amo tia,  
mi ade muldas plu  
dankemon pro l' privilegio  
esti kreito dia.

Rio de Janeiro /Juiz de Fora, 16/05/2015.

## Mori (Usono)



## AFORISMO (6)

La problemo ne estas  
Unu, du, tri,...  
despotoj,

La problemo estas  
sennombraj  
IDIOTOJ!

\*\*\*

Tie, kie oni forcedas  
liberecon pro sekureco  
oni perdas kaj liberecon  
kaj sekurecon!

\*\*\*

Azeno  
sur alta posteno  
ankoraŭ estas  
azeno

\*\*\*

Malgrandas  
tiu persono  
kies grandeco dependas  
de l' mono,  
aŭ posteno!

\*\*\*

Reĝo vera  
estas tiu persono  
kiu vivas reĝece  
sen reĝa posteno!

\*\*\*

Politikisto  
estas nomo  
de l' putrinta, venena ,  
Malutila ...terpomo!

\*\*\*

Homo kiu ne zorgas  
pri l' sorto de l' kunhomo,  
ne pli vivas ol senviva  
TERPOMO!

\*\*\*

Nenio pli fiodoras  
ol putrinta terpomo  
kaj ORGOJLA homo!

\*\*\*

Modesta homo  
kun afabla koro  
estas ja bela  
samkiel floro.

\*\*\*

En ĉio  
estas konscio;  
la ununura  
Dio!

\*\*\*

Sen humaneco,  
HOMO  
estas nur vakua  
Nomo!

\*\*\*

Idioton je la servo de  
despoto  
Oni malhoneste nomas;  
Patrioto!

\*\*\*

Via vivo estas  
via spegulo  
por vidi bonon  
estu bonfarulo!

\*\*\*

sendepende  
de via mondo  
reala  
revu pri  
via mondo  
ideala!

\*\*\*

Nur tiu pri aliulo  
mokridas  
kiu sin en la spegul'  
ne vidas!



## Paŭlo Silas (Brazilo)



LA TEMO

Se hodiaŭ vi verkas pri Twitter,  
Sciu, ke morgaŭ neniuj komprenos vin.  
Nov' naskiĝas, nov' iĝas jam antikva  
Kaj malaperas de sur kontinentoj kvin.

Virtuale vivante, vi volas  
La vizaĝon alŝuti al Facebook.  
Vane la bildo pentriĝas surekrane:  
Bit' vin ne savos, vin vindos mortotuk'.

Ĉu, pri mp3, paroli? Ĉu pri pdf?  
Venontaj formatoj ilin priridos fiere:  
Fruaĝaj malkovroj, teknologi-ABC!

Do, pri provizoraj aĵoj, statu malklere  
La vers' arton intencanta per ĉi ambici':

Anima nuanc' eniru poemojn de ni.

AMI MILMANIERE

Surprizo, se al seks' allogas samseksulon,  
Se iri laŭkonvene kaŭzas nur torturon;  
Se staras ili malsimile al aliaj  
Kaj montras sin malsamaj formoj familiaj.

Milmaniere oni amas kaj respektas:  
Akvumi floron, kiu en ĝarden' perfektas.  
Domhundon varti per atento senriproĉa.  
La malsanulojn nekonatajn flegi do, ĉar

Meritas ankaŭ ili homdonitan zorgon.  
Ĉu nei al la samseksama sent' apogon?  
Permesi ne devus ni tian cenzuron.

La mondo jam plenas je kompren-simulo.  
Skandalas pli ŝajnigoj laŭsitaciaj  
Ol spiti banalaĵojn bonreputaciajn.

## Cezar (Germanujo)



Mi, la azeno,  
kaj ŝi

### Ŝi, la poetino

Vi rajtas min demandi ĉiam,  
egale, pri kio temas,  
vi estas kiel frato.  
Mi eltenos ankaŭ  
vian kritikon,  
kaj aŭskultos vin.  
Mi volas esti  
kvazaŭ fratino por vi.  
Demandu min,  
mi helpos al vi plori  
ĉe la brusto de via edzino.  
Sed lasu min esti mano via,  
se vi bezonas min.  
Mi ne estas infano,  
Mi estas via ombro,  
kiu staras malantaŭ vi.

Mi estas via spegulbildo,  
 parolu kun mi.  
 Mi konsolos vin kaj ŝin.  
 Vortoj povas ensorĉigi,  
 tuŝi ĝisplure kaj ridigi vin.  
 Aŭ ĵeti en desperon.  
 Ni agu atenteme,  
 ni, la vortmetistoj.  
 Mi admiras vin.  
 Vi trovis bonan vojon.  
 Tio estas permesata,  
 ke mi apogas mian kapon  
 al via ŝultro kaj vidas vin  
 verkanta, kaj tio,  
 kion vi skribas,  
 albordiĝos  
 en mia koro.  
 Vi atingis,  
 ke miaj tagoj  
 estas buntaj.  
 Mi mallaŭte dankas al vi.  
 Kaj al ŝi por la rideto  
 kaj por la koloroj...,  
 kiel fratino via.

## Jadranka Miric (Serbujo)



### Forflugis kolombino


Forflugis kolombino  
 el nesto sia, ho.  
 Revenu, perfidulino  
 ne volas mi  
 alian birdokanton, do..

Sorto malboniĝas.  
 Revenu ŝin al mi.  
 Sopiro turmentas  
 vivon mian, sen ŝi.

Revenu, perfidulino, kara.  
 Ne rompu la nestoflugilojn.  
 Sed en la nesto nia

oni plu aŭdiĝu kant' birdara.  
 Revenu, karega mia.

Ĉiu birdo ne flugas alten  
 nek havas falkokulon.  
 Sed ĉiu flugas al sia flugantaro.  
 Rememoru vi, ties vortojn.  
 Memoru min, kara, memoru.



## Somera amo

Ekis somero.  
 Komence pluvis  
 sed daŭre belas vetero .  
 Forte suno , la tero-solarilo  
 ĉiun sunumas,  
 dum aero flore parfumas.

Fruktoj rapide maturiĝos,  
 greno baldaŭ rikoltiĝos.  
 Al kamparanoj haŭto bruniĝos!  
 Pro varmo niaj vangoj, jen, ruĝiĝas.  
 Prenante florbukedon la manoj  
 ŝvitiĝas  
 pro vi, mi embarasiĝas

## Siv Burell (Svedujo)



### Testamente numero tri

Kiel konfuzitaj birdoj ni venis,  
 ne trovis la ŝatatan trankvilon.  
 La gvidanto nin benis,  
 promesis ĉielan savilon.  
 Sed Kristo kiel Savanto  
 de mi — malmorale!  
 Ĉu devas respondeci totale

Por siaj propraj pekoj

la gvidanto parolas pri fido,  
fido al la Savanto.


Ĉu sufiĉas nur konfido  
al la ekzamena sistemo  
por doktoriĝi — kaj emo  
ŝati teknikon por fariĝi  
teknikisto, instruisto?  
Ne! Laboru kun persisto!

Dum du miloj da jaroj  
la homoj havis sperton  
kaj nun estas aroj,  
kiuj postulas lerton  
kaj trian testamenton,  
adaptite por scienco  
kaj eternaj amleĝoj  
kaj noviĝo de la penso.



*Pentraĵo de la aŭtorino*

## Leiel (Meksikio)



# Respondeco


Vivi, iamaniere...  
elekti... kaj alfronti konsekvencojn...  
kion fari...  
Pri stulteco... la mia... la via...  
kion fari ?  
Ĉu iu neniam eraris ?  
la vero...  
pri rideti, pri plori, pri juĝi, pri moki sin...  
pri nepropa situacio...  
Mi eraras min, vi eraras vin, ili eraras sin...  
Ĉiuj eraras sin...

Pardoni...

Mi pardonas vin, vi pardonas min, kaj ilin...  
ili... ili pardonas...



## Vinicius de Moraes (1913-1980)



# Sambo pri rozo

Rigardinda roz', rozo kaj admir'  
Kreskiĝanta roz', roz' por posta mir'  
Plenvivanta roz', roz' por amdelir'  
Por rikolti roz', kaj tuj por disŝir' ...  
Por endormi roz', por dormodeir'  
Rozo por ridet' kaj ĉe l' plorsuspir'  
Rozo, ke vi restu, estu ne plu ir'  
Flanke de mi estu nur rozvirin'  
Jen primtemp' ĉeas  
Jam burĝonas la roz'  
Kor' ne plu veas  
Sur ĝi estas roz' en ripoz'



*Esperantigis*



**Uel Roŝa (Brazilo)**

## Ali Podrimja (1942-2013)



# Kulpas albano

Kulpas albano  
 ĉar li vivas  
 kaj iradas sur du piedoj

ĉar li senĉese englutas tablojdojn por  
 trankviliĝi  
 kaj dum tagoj ĉasas muŝojn  
 en sia necesejo

Kulpas albano  
 ĉar li malhonoras sian edzinon  
 kaj mian familion teruras

Ĉar la pomo sur alta branĉo  
 kiun ne atingis mia mano  
 mort-vorte falis en la Puton

Kulpas albano  
 ĉar en la mondo ne troviĝas la alia  
 Turkujo Ameriko kaj Norvegio  
 kaj la Gulago estas tro malproksime

Kulpas albano  
 ĉar li iradas malsata  
 kaj ne dormas nokte

Ĉar fendiĝis niaj kanaltuboj  
 kaj la Balkana Katakombo  
 estas detruita

Kulpas albano  
 ĉar li desegnas sian vizaĝon ĉe

lunolumo  
 kaj tra la fenestro elverŝas malpuran  
 akvon

Kulpas albano  
 ĉar li parolas albane  
 ĉar li manĝas kiel albano  
 ĉar li fekas kiel albano

Kulpas albano  
 albano estas kulpa  
 pri mia tuta malprospero

kaj tial pro miaj difektitaj dentoj  
 pro mia morta rideto  
 pro tio kaj alio: Kuglon en la kapaĉon

ha ha ha  
 ha ha  
 ha

Por ke vi kompatu lin Dio



# Monstro

Ĝi sidis sur la branĉo  
 mi etendis la manon al ĝi  
 mi volis eniri en la ĝardenon

Unue mi instruis al ĝi mian nomon la abocon  
 Poste kiel konstrui domon  
 kiam ili detruos la murojn

Kune ni migris tra Montetoj Kampoj Maroj

Subite ĝi komencis furioze skuadi la branĉon  
per ungegoj  
Inter miaj songoj li elŝiris vundon tri polmojn  
larĝan  
Per langopinto li frostigis miajn vortojn

Li elpikis la okulojn al mia amo miljara  
Nudigis mian animon  
Poezion

Nun ĝi muĝas sur la transa bordo  
kun mia kapo  
sur lanco

Kaj mi ja etendis la manon al ĝi  
Antaŭ ol mi eniris en la ĝardenon  
mi klarigis al ĝi la diferencon  
inter Homo kaj Besto

*Esperantigis*



**Bardhyl Selimi**

**(Albanio)**

**Zhuangzi (369-286 a.K)**



**Zhuangzi**

**ĈAPITRO TRIA**

**La konservo de la vivo**

**§03-01**

La homa vivo estas limigita, sed la sciado estas senlima. Tiu, kiu submetas sian limigitan

vivon al la ĉasado de la senlima sciado, fatale sin lacigas; jam lacigita, li tamen plu ĉasadas sciojn, kio estas ankoraŭ pli fatala!

Kiam vi faras bonon, ne faru ĝin pro la famo. Kiam vi faras malbonon, nepre bridu vin, ke vi ne estu punita. Se vi ĉiam tenas vin je la ĝusta mezo, vi povos gardi vin de ĉia malutilo, konservi vian naturon, plenumi viajn devojn al viaj gepatroj kaj vivi la plenan vivdaŭron al vi destinitan.

**§03-02**

La kuiristo de la princo Wenhui dismembrigis buĉitan bovon. Ĉe ĉiu ektuŝo de lia mano, ĉiu movo de lia ŝultro, ĉiu frapo de lia piedo kaj ĉiu puŝo de lia genuo, aŭdiĝis la sono de tranĉil-svingo kaj karnotranĉado — ritmo tiel perfekta, kiel la dancmuziko *Morusarbaro*, kaj melodio tiel harmonia, kiel la muzikaĵo *Jingshou* en la epoko de la reĝo Yao.

“Ho, kiel belege!” admire ekkriis la princo. “Vi havas tiel majstran lertecon!”

“Via moŝto,” la kuiristo demetis sian tranĉilon, “mi ĉiam dediĉas min al la Taŭo, kiu estas pli alta, ol mia lerteco. Kiam mi komencis mian karieron dismembrigi bovon, mi vidis nenion alian krom la tuton de la besto. Tri jarojn poste, mi vidis ĝin ne plu kiel tuton, sed kiel partojn. Nun mi laboras super ĝi per mia intuicio, sen ĝin rigardi per miaj okuloj. Dum mia intuicio laboras laŭ sia maniero, mia vida organo ĉesas funkcii. Konforme al la natura korpostrukturo bova, mi glitigas mian tranĉilon tra grandaj kuniĝoj, artikoj kaj kavoj, kaj fendas la karnon disde la ostoj. Tiele mi neniam tuŝas muskolnodojn, nek tendenojn, por ne paroli pri la grandaj ostoj.



“Ordinare bona kuiristo ŝanĝas sian tranĉilon unu fojon en jaro, ĉar li tranĉas la karnon; ordinara kuiristo ŝanĝas sian tranĉilon unu fojon en monato, ĉar li hakas la ostojn. Uzante tiun ĉi tranĉilon dum dek naŭ jaroj, mi dismembrigis milojn da bovoj, sed la eĝo de mia tranĉilo restas ankoraŭ tiel akra, kvazaŭ ĝi estus ĵus akrigita sur ŝtono. Inter la kuniĝoj de ostoj troviĝas interspacetoj, sed la rando de mia tranĉilo havas apenaŭan dikecon. Kiam mi enŝovas la tre maldikan klingon en tiujn ĉi kuniĝojn, tiam estas ankoraŭ sufiĉa interspaco, por ke ĝi povu tramoviĝi. Jen kial, post dek jaroj, la eĝo de mia tranĉilo estas ankoraŭ tiel akra, kvazaŭ ĝi estus ĵus akrigita.

“Kaj tamen ĉiufoje, kiam mi renkontas komplikan parton kaj trovas malfacila enmeti la tranĉilon, mi estas ekstreme singarda. Tiam mi tenas miajn okulojn sur tio, kion mi faras, kaj malrapide kaj delikate svingas la tranĉilon, ĝis la parto cedas kaj falas teren kiel bulo da argilo. Tenante la tranĉilon en mia mano, mi staras tie, rigardante ĉirkaŭen kun mieno triumfa kaj tre memkontenta. Poste mi purigas la tranĉilon kaj remetas ĝin en ĝian ĝustan lokon.”

“Brave!” ekkriis la princo Wenhui. “Aŭdinte tion, kion vi ĵus diris, mi ellernis la manieron konservi bonan sanon.”



*Esperantigis*



**Wang Chongfang**

(Ĉinujo)

# Ĉineske

**Jadranka Miric (Serbujo)**

## AL MIAJ ĜEAMKROJ

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Poeto,  
el la fora land',  
poemon ĉi sendas mi  
Vivu la lando de pand'  
kaj ĉi prunoland'!

Valoras  
ĉi amikeco,  
pro longtempa amikad'  
Veras kamaradeco,  
solidareco.

Akcepto  
kora, sincera.  
Profundan dankon, karaj.  
Estis mi senespera  
kaj tutsevera.

Vi faris  
magion. Lumoj  
diverskoloraj ombre  
ŝanĝiĝis. Kaj pensoj per  
sanigaj larmoj.

Homeco  
kaj afableco  
nestis profunde. Brile  
oriĝis bonkoreco.  
Ho, amikeco!

**Lily (Ĉinujo)**

## Valenteno sen Amato

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*



sengusta  
 morna valenten'  
 pro malesto de amat'  
 kun donac' de ama ben'  
 mi en splen', ĉagren'

brulege  
 kun juk-maltrankvil'  
 kore kaj korpe flame  
 soifas mia subtil'  
 al forta boril'

nek rozon  
 nek ĉokoladon  
 mi volas, sed de amat'  
 violentan invadon  
 kacan nomadon

## Sam (Ĉinujo)

### Renkontiĝo de S-anoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

saluton!  
 la verda vorto  
 ŝvebas ĉe renkontiĝ' de  
 esperanta kohorto  
 kun vigla forto

manpremad'  
 senta esprimo  
 varmigas ĉies korojn  
 kun samcela intimo  
 de malproksimo

brakumad'  
 kara alligo  
 revakas rememorojn  
 kun kuraĝa instigo  
 al plu-navigo

vin-tostad'  
 ĉe la koktelo  
 levas verdan fervoron  
 por samklopoda celo

kun brila helo  
 parolad'  
 pri granda plano  
 altiras manklakadon  
 je la granda elano  
 de verda klano

*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Pei Xing (nekonataj datoj de N. kaj M.)

## La Filino de Generalo Nie

NIE Yinniang estis filino de Nie Feng, generalo sub armeestro de Weibo dum Zhenyuan-erao (785-805 p.K.), Tang-dinastio. Kiam Nie Yingniang estis 10-jara, foje venis bonzino al domo de ŝia patro peti almozon. Vidante la knabinon, la bonzino ĝojis kaj sin turnis al la generalo kun demando:

"Ĉu vi permesas ke mi forkonduku vian filinon kiel mian disciplinon por instrui al ŝi luktarton?"

Nie Feng eksplodis de kolerego kaj insultis. Sed la bonzino diris: "Mi certe forŝtelos ŝin, eĉ se vi kaŝos vian filinon en ŝlosita fera ŝranko!"

Kaj, en la sama nokto, la knabino efektive forperdiĝis.

Nie Feng konsterniĝis kaj ordonis traserĉi ĉien sed sukcesis trovi nenian informon de sia filino.

Sopirante pri sia filino, la gepatroj nur povis larmi triste unu kontraŭ alia.

Post kvin jaroj, la bonzino sendis Nie Yingniang hejmen reveni kaj diris al la generalo:

"Mi jam bone instruis vian filinon kaj nun redonas ŝin al vi." Dirinte tion, la bonzino subite malaperis. La tuta familio sentis samtempe kaj ĝojon kaj malĝojon. Ili demandis, kion ŝi ellernis.

"Komence mi lernis nur reciti sutrojn kaj sorĉajn vortojn," respondis Nie Yingniang. "Krome nenion."

Sed la patro ne kredis kaj insiste demandis.

"Se mi diras veron, vi certe ne kredos. Kion diri?" respondis Nie Yingniang.

"Diru la veron!" la patro ankoraŭ insistis.

Kaj Nie Yingniang respondis:

"En la tago, kiam la bonzino forportis min, mi ne sciis, kiom longe ŝi iris. La sekvan matenon, ni atingis malplenan lokon de granda ŝtona kaverno, larĝan je dekoj da paŝoj. Troviĝis neniuj loĝantoj tie. Vivis nur amasoj da simioj kaj dense kreskis usneoj. En la kaverno jam estis du aliaj knabinoj, kiuj venis antaŭ mia alveno. Ambaŭ estis 10-jaraj, belaj kaj spritaj. Ili manĝis nenion, sed scipovis flugrapide iri sur krutaĵoj sen stumbleto, kvazaŭ simioj facilmove grimpus arbojn. La bonzino donis al mi pilolon ke mi englutu. Ŝi donis al mi ankaŭ glavon, longan je pli ol du futoj, kiu estis tiel akrega, ke haro metita sur ĝia klingo interrompiĝus sub eta blovpuŝo. La bonzino ordonis ke mi postkuru sekvante la du knabinoj sur krutaĵoj, tiel ke iom post iom mi sentis min tiel malpeza kaj facilmove kvazaŭ ventblovo. Post unu jaro, mi povis mortigi simiojn per la glavo kaj neniam malsukcesis. Poste mi atakis tigrojn kaj leopardojn, kaj revenis ĉiam kun dehakitaj kapoj de tiuj rabobestoj. Post tri jaroj mi povis flugi kaj ataki aglojn, ĉiam celtrafe. La bonzino do anstataŭigis mian armilon per ponardo longa je malpli ol kvin koloroj, per kiu mi atakis birdojn kiuj eĉ ne povis scii de kie venis la atakanto.

En la kvara jaro, la bonzino ordonis ke la du knabinoj postrestu gardi la ŝtonan kavernon kaj ŝi gvidis min al urbo, kies nomon mi ne sciis. La bonzino montris al mi iun homon, detale konigante al mi pri liaj krimoj, kaj ordonis: 'Senkapigu lin kaj lasu neniun rimarki vian agon. Estu kuraĝa! Tio estas tiel facila

kiel via atako al fluganta birdo!'

La bonzino donis al mi ŝafkornan ponardon, longan je tri koloroj. En hela tago mi senkapigis tiun fiulon, sed neniuj povis vidi min. Mi metis la kapon en sakon, revenis kun ĝi al hejmo de mia majstro. Per medikamento mi likvigis la kapon akvo.

En la kvina jaro, la bonzino diris al mi: 'Iu altrangulo faris gravajn krimojn, li mortigis multe da homoj sen justa kaŭzo. Nokte vi eniru lian ĉambron kaj revenu al mi kun lia kapo!'

Kun ponardo mi iris al lia ĉambro, enŝteliĝinte sen ajna malfacilo. Mi kaŝis min sur trabo de lia domo. Mi revenis al mia majstro nur en noktomezo kun lia kapo.

La bonzino kolere demandis al mi: 'Kial vi revenas tiel malfrue?'

Mi respondis: 'Komence mi vidis ke li ludis kun aminda bebo, tial mi ne tuj agis senprokraste.'

Sed la bonzino riproĉis min: 'Poste, en simila okazo, vi mortigu unue lian infanon kaj poste lin mem.'

Mi jesis riverence, kun danko al ŝia instruo.

La bonzino diris al mi: 'Mi malfermu vian postkranion por tie kaŝi ponardon, kio neniam vundos vin. Kiam vi bezonos la ponardon, eltiru ĝin de tie.'

Kaj ŝi aldonis: 'Vi jam ellernis mian kapablon kaj nun devas hejmen reveni.' Tiel, mia majstro sendis min revenen. Adiaŭante ŝi diris: 'Ni havos revidon nur post 20 jaroj!'

Aŭdinte la rakonton de sia filino, la generalo sentis timon.

Post tio Nie Yingniang malaperis ĉiun nokton kaj revenis hejmen ĉe la tagiĝo. Ŝia patro la generalo ne plu demandis pri ŝia konduto kaj ankaŭ ne tre amis ŝin.

Iutage, venis al ŝia hejmo juna spegulisto.

"Li povas fariĝi mia edzo," Nie Yingniang diris.

Ŝi raportis tion al sia patro. La generalo ne

kuraĝas malkonsenti, kaj ŝi edziniĝis.

La juna viro scipovas nenion krom hardi spegulojn. La generalo donacis abundan doton al la juna paro kaj ili fiksloĝiĝis en aparta domo.

Post kelkaj jaroj, mortis la patro de Nie Yingniang. La armeestro de Weibo iom informiĝis pri la neordinaraj kapabloj de Nie Yingniang kaj engaĝis ŝin en sian gardadon kontraŭ alta salajro. Kaj tiel pasis kelkaj jaroj. En Yuanhe-erao (806-821 p.K.), la armeestro de Weibo malkonkordis kun Liu Changyi, la armeestro de Chenzhou-Xuzhou, kaj ordonis Nie Yingniang senkapigi Liu. Ricevinte la taskon Nie Yingniang adiaŭis la armeestron de Weibo kaj ekveturis al Xuzhou. Sed Liu estis lerta en aŭgurado, tiel li jam anticipis sciis ke Nie Yingniang baldaŭ venos. Liu kolektis siajn subulojn-oficiojn kaj diris al ili:

"Morgaŭ matene vi iru al la norda pordo de nia urbo por atendi tie junan geedzan paron. Ili rajdos sur blanka kaj nigra azenoj respektive. Kiam ili venas al la urba pordo, bruas al ili pigoj. La edzo arkpafis la birbon, sed mistrafos. Tiam la edzino transprenos lian arkon, pafos kaj tuj trafos. Vi respekte salutu al ili, dirante, ke mi volas vidi ilin, tial sendis vin atendi ĉe la urba pordo."

La oficiroj agis laŭ ordono de Liu kaj efektive renkontis la geedzan paron.

"Ho, lia generala moŝto Liu vere estas dia. Alie, kial li povas antaŭscii tiel bone pri nia alveno? Ni volas viziti lian generalan moŝton."

Ĉe renkontiĝo Liu bonvenige konsolis ilin. La geedzoj riverencis al li kaj Nie Yingniang diris:

"Ho, mi preskaŭ faris krimegon kontraŭ vi kaj nun humile petas vian pardonon!"

"Ne grave!" Liu respondis grandanime. "Estas nature kaj tute kompreneble ke ĉiu homo servu fidele laŭ ordono de sia propra superulo. Ĉi tie estas same bone kiel Weibo, kaj mi kore invitas vin resti ĉe mi. Bonvole ne

dubu pri mia sincereco!"

Nie Yingniang dankis, respondante: "Se mankas al via generala moŝto kompetentaj gardistoj, mi volonte forlasu Weibon kaj servos ĉe vi la admirinde saĝa komandanto." Ĉar Nie Yingniang jam estas certa ke la armeestro de Weibo estas malpli kapabla ol Liu.

Liu demandis kion ili bezonas. Nie Yingniang respondis: "Ĉiutage 200 moneroj jam sufiĉas por nia vivo."

Liu tuj konsentis tion, kaj la geedzoj restis ĉe li. Ĉar Liu rimarkis ke la du azenoj malaperis, li ordonis serĉi, sed povis trovi nenian spuron. Poste, oni kaŝe serĉis la sakon de Nie Yingniang kaj vidis tie blankan kaj nigran azenojn, ambaŭ el papero.

Pasis pli ol unu monato. Nie Yingniang diris al Liu: "Ĉar la armeestro ricevis nenian informon de mi, li certe sendos alian homon daŭrigi la planon vin murdi. Hodiaŭ vespere mi tranĉos tufon da haroj, volvis ĝin per ruĝa silkaĵo kaj metos ĝin sur la kapkuseno de la armeestro de Weibo por sciigi al li ke mi ne plu servos al li." Liu konsentis.

Je la kvara nokta gardoperiodo Nie Yingniang revenis de Weibo kaj diris al Liu: "Mi jam donis sciigon al li, sed postmorgaŭ nokte li certe sendos Sagacan asasini min kaj senkapigi vin. Tiam mi certe mortigos la sikarion. Estu do trankvila, mi petas."

Ĉar Liu estis brava kaj grandanima, li aspektis neniom timanta.

En la nomita nokto, Liu ordonis bruligi kandelon. Post la noktomezo, Liu efektive vidis ke du flagoj, ruĝa kaj blanka, ŝvebe batalis unu kontraŭ la alia ĉirkaŭ lia lito. Post longa momento, ekfalas teren homo senkapigita. Tiam aperis Nie Yingniang, dirante: "Sagaca jam mortigita!"

Ŝi fortrenis la kadavron en la halon, per medikamento likvigis ĝin akvo, kaj malaperis ankaŭ la haroj.

Nie Yingniang diris al Liu: "Postmorgaŭ

nokte la armeestro de Weibo certe sendos la Lertmanan Malplenen ĉi tie por la sama celo. Li posedas dian magion. Neniu scias kiom kapabla li estas. Eĉ diabloj ne povas trovi lian spuron. Li povas agi de malplena loko en senliman kaj tre lertas kaŝi aŭ forigi sian ombron. Mia kapablo ne povas rivali kun la lia. Tial la sekureco de via generala moŝto dependas tute de via fortuna. Protektu vian kolon per jado de Hetian kaj volvu vian tutan korpon per litkovrilo, dum mi transformiĝu en minimume malgrandan insekton kaj kaŝiĝu en vian internaĵon por atendi konvenan ŝancon. Krome, ni trovos neniun alian kontraŭrimedon."

En la difinita tago, je la tria nokta gardoperiodo, Liu kun fermitaj okuloj atendis. Subite aŭdiĝis drasta kraktino sur la nuko de Liu.

Nie Yingniang elsaltis el la buŝo de Liu kun gratulo: "Nun jam forpasis la danĝero por via generala moŝto! Tiu sikario Malpleno agas kiel aglo: se li ne trafis je la unua atako, li hontas pri sia mistrafo kaj tuj forflugis malproksimen. En momento de malpli ol unu nokta gardoperiodo li forflugis jam mil liojn." Nie Yingniang ekzamenis la jadon ĉirkaŭ nuko de Liu kaj trovis fortan tranĉon de ponardo, profundan je colonoj.

De tiam Liu traktis Nie Yingniang kun pli granda respekto.

En la oka jaro de Yuanhe-erao (813 p.K.) Liu Changyi veturis de Xuzhou al la ĉefurbo por peti aŭdiencon de la imperiestro, sed Nie Yingniang ne volis akompani lin en la vojaĝo. Ŝi diris: "De nun mi vizitos al pitoreskaj lokoj por serĉi bonvirtajn verulojn." Ŝi petis salajri sian edzon sen fakta funkcio. Liu konsentis. Post tio iom post iom neniĝis ŝia informo.

Kiam Liu mortis sur sia ofico de ĉefurba marŝalo, Nie Yingniang venis rajdante sur azeno. Ŝi funebris ploure antaŭ lia ĉerko kaj foriris.

En Kaicheng-erao (836-840 p.K.), Liu Zong, filo de Liu Chengyi, estis nomumita kiel prefekto de Lingzhou. Survoje al sia ofico en kornica vojo de Sichuan li renkontis Nie Yingniang, kiu aspektis tute same kiel ŝi servis ĉe lia patro, kaj ankaŭ rajdis sur la blanka azeno.

Liu Zong tre ĝojis pro la revido. Sed Nie Yingniang diris al li: "Vin minacas granda misfortuno, kaj vi ne devas resti ĉi tie."

Ŝi donacis al li unu pilolon, petante ke li englutu ĝin, kaj admonis:

"En la venonta jaro, nepre eksoficiĝu kaj rapide revenu al Luoyang, nur tiamaniere vi evitos la danĝeron, ĉar mia pilolo efikos nur unu jaron por protekti vin."

Liu Zong ne tre kredis pri ŝia averto. Li donacis al Nie Yingniang silkaĵon kc., sed ŝi akceptis nenion. Ŝi foriris nur post drinko ĝis ebriiĝo.

Forpasis unu jaro. Liu Zong ne klopodis por eksoficiĝi kaj efektive mortis en la prefektujo Lingzhou.

De tiam neniu vidis Nie Yingniang plu.

*\*La filmo "Murdistino Nie Yinniang", kiu estas direktita de Hou Hiaohien (Tajvano), estis aljuĝita la premio de plej bona reĝisoro, dum la 86-a Filmfestivalo de Cannes (majo de 2015). La filma intrigo estas adaptita el ĉi tiu rakonto de Tang-dinastio.*

**Esperantigis**



**Guozhu (Ĉinujo)**

—◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇—

Eldonas Redakcio de **Penseo**

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,  
Chongqing, 400020, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin  
turnu al [www.elperno.cn/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penlisto.htm) aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

—◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇—